Course - "Ana renkontas..."

Contents

Tests with questions
Exercises
Correct answers

[www.lernu.net - Multlingva paĝaro por informiĝi kaj lerni Esperanton.]

Introduction

The course consists of eight parts. The idea is that for every part, you should: 1) read a text/dialogue and send responses to the questions to a tutor 2) do the "dialogue exercises", which are also sent to a tutor. The tutor later responds to you with whatever corrections and comments are needed.

All communication in this course will take place in Esperanto. So, if you have a question or comment, try to phrase it in Esperanto.

Communicating with others is an essential part of language. To help you do this in Esperanto, we've created this course.

Good "chatting"!

Overview

The course consists of eight parts and the main role is played by Ana from New York:

Parto 1 - ...sian amikon
Parto 2 - ...sian patrinon matene
Parto 3 - ...sian tenisopartneron
Parto 4 - ...sian klason
Parto 5 - ...siajn gefratojn posttagmeze
Parto 6 - ...sian iun
Parto 7 - ...sian patron vespere
Parto 8 - ...sian ĉinan amikinon

Desegnis Helen Claesson, verkis Hokan Lundberg

"Parto" means "part".

Parto 1 - ...amikon

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Ana: Saluton!
Amiko: Ana, saluton!
Ana: Agrable renkonti vin! Kiel vi fartas?
Amiko: Tute bone, dankon. Kaj vi?
Ana: Ankaŭ bone. Dum longa tempo mi ne vidis vin. Kion vi faras nuntempe?
Amiko: Mi studas. Dum preskaŭ jaro jam, ĉe la universitato.
Ana: Interese, kion vi studas?
Amiko: Komputikon. Do, temas pri programado, Interreto ktp. Mi tre ŝatas.
Ana: Bonege.
Amiko: Kio pri vi? Kio nova?
Ana: Mi decidis fari novan longan vojaĝon. Mi nur devas enspezi iom da mono unue...
Amiko: Vi vere estas vojaĝema! Nekredeble... Ĉu ni iru al kafejo kaj vi rakontu pri viaj vojaĝplanoj?
Ana: Bona ideo! Kaj mi volas aŭdi pli pri la studenta vivo.
Amiko: Mi scias pri taŭga kafejo en la apuda strato.
Ana: Do, eku ni!

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kion faras la amiko kiun Ana renkontis?

2) Pri kio volas Ana kaj ŝia amiko paroli en la kafejo?

3) Ĉu vi ŝatas sidi en kafejo? Kion vi kutime faras en kafejo?

Dialogue Exercises for part 1

Zam: Saluton!
Vi: _____

Zam: Mia nomo estas Zam. Kiel vi nomiĝas?
Vi: _____

Zam: Ne, mi ne pensas ke ni renkontiĝis antaŭe. Tamen, estas agrable renkonti vin nun. Kiel vi fartas?
Vi: _____

Zam: Mi fartas tre bone, dankon! De kie vi venas?
Vi: _____

Zam: Mi loĝas ĉefe en Interreto, tre interesa loko, mi devas diri. Kion vi faras ĝenerale?
Vi: _____

Zam: Mia profesio estas instruisto, mi instruas lingvojn per kursoj ĉe Interreto. Kiam vi eklernis Esperanton?
Vi: _____

Zam: Mi esperantistiĝis kiam mi estis studento, do antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj. Estis bone konatiĝi kun vi! Mi devas iri nun. Fartu bone kaj ĝis poste!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 1

Zam: Saluton!
Respondoalternativoj:

- Saluton! Kio estas via nomo?
- Sal! Kiu vi estas?
- Sa! Kiel vi nomiĝas?

Zam: Mia nomo estas Zam. Kiel vi nomiĝas?
Respondoalternativoj:

- Mia nomo estas X. Ĉu ni renkontiĝis antaŭe?
- Mi nomiĝas X.
- Mi rekonas vin, ĉu mi renkontis vin antaŭe?

Zam: Ne, mi ne pensas ke ni renkontiĝis antaŭe. Tamen, estas agrable renkonti vin nun. Kiel vi fartas?
Respondoalternativoj:

- Bone. Kaj vi, kiel vi fartas?
- Ege bonege! Kiel vi?
- Ne tute bone. Mi havas malvarmumon. Kio pri vi?

Zam: Mi fartas tre bone, dankon! De kie vi venas?
Respondoalternativoj:

- Mi venas de Japanio. Kaj vi?
- Mi loĝas en Stokholmo, Svedio. De kie vi estas?
- Mi estas de urbeto en Peruo. Kie vi loĝas?

Zam: Mi loĝas ĉefe en Interreto, tre interesa loko, mi devas diri. Kion vi faras ĝenerale?
Respondoalternativoj:

- Mi estas studento pri historio. Kio estas via profesio?
- Programas hejmpaĝojn. Kaj vi?
- Mi estas senlabora momente kaj serĉas novan laboron. Kion vi faras?

Zam: Mia profesio estas instruisto, mi instruas lingvojn per kursoj ĉe Interreto. Kiam vi eklernis Esperanton?
Respondoalternativoj:

- Mi komencis antaŭ kelkaj monatoj. Kiam vi eklernis la lingvon?
- Estis antaŭ sufiĉe longa tempo. Kaj vi?

Zam: Mi esperantistiĝis kiam mi estis studento, do antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj. Estis bone konatiĝi kun vi! Mi devas iri nun. Fartu bone kaj ĝis poste!
Respondoalternativoj:

- Ankaŭ vi Zam! Ĝis la!
- Ĉion bonan al vi! Ĉaŭ!
- Dankon! La samon. Ĝis iam!

Parto 2 - ...sian patrinon matene

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Ana: Bonan matenon, panjo!
Panjo: Bonan. Ĉu vi jam estas veka?!
Ana: Jes, mi volas ludi tenison antaŭ ol iri al la lernejo.
Panjo: Mi komprenas. Ĉu vi bone dormis?
Ana: Ne tre... Mi sonĝis ke mi havas ekzamenon en la franca kaj ke ĝi estas ege malfacila.
Panjo: Do, eble vi studu pli multe pri la franca.
Ana: Jes, mi scias, sed mi vere ne havas emon pri tio!
Panjo: Mi ne povas kompreni tion... Lerni novan lingvon ja estas tiom interese!
Ana: Por vi ja, sed por mi tio estas nur granda ĝeno. Estas multe pli amuze sportumi por mi!
Panjo: Jes, mi scias ke vi pensas tion... Tamen, mi volonte helpos vin pri la franca se vi volas.
Ana: Dankon, panjo! Ni vidos, mi devas kuri nun. Grava ludo atendas baldaŭ. Ĝis la!
Panjo: Ĝis kaj bonan tagon!

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kion Ana volas fari antaŭ ol iri al la lernejo?

2) Kion la patrino de Ana ne povas kompreni pri Ana?

3) Kial Ana hastas?

Dialogue Exercises for part 2

Zam: Bonan matenon! Kiel vi dormis ĉi-nokte?
Vi: _____

Zam: Mi bonege dormis. Sed ne sufiĉe! Mi devis ellitiĝi je la kvina kaj duono. Estis terure. Kiam vi ellitiĝis?
Vi: _____

Zam: Mi enlitiĝis je kvarono antaŭ la dua, alievorte unua kaj kvardek kvin. Kio pri vi?
Vi: _____

Zam: Matene mi manĝas nur fruktojn, ion alian mia organismo ne volas komence de la tago. Kion vi preferas kiel matenmanĝon?
Vi: _____

Zam: Kiam mi matenmanĝas mi spektas novaĵojn en la televido aŭ legas gazeton. Kaj vi, kion vi faras dum vi matenmanĝas?
Vi: _____

Zam: Ĉi-nokte mi sonĝis ke mi ludas tenison kaj ke mi bonege ludas. Subite venis iu grandega policisto kaj kaptis min ĉar mi tro bone ludis. Estis tre stranga sonĝo... Ĉu vi sonĝis ion?
Vi: _____

Zam: Interese.. Tempo por labori. Ĝis, amiko!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 2

Zam: Bonan matenon! Kiel vi dormis ĉi-nokte?
Respondoalternativoj:

- Mi tre bone dormis, ĉu ankaŭ vi?
- Dankon, mi bone kaj longe dormis. Kia estis via nokto?

Zam: Mi bonege dormis. Sed ne sufiĉe! Mi devis ellitiĝi je la kvina kaj duono. Estis terure. Kiam vi ellitiĝis?
Respondoalternativoj:

- Mi ellittiĝis iom post la oka. Kiam vi enlitiĝis?
- Je la kvina kaj tridek. Mi ĉiam ellitiĝas tiam pro mia laboro. Ĉu vi malfrue enlitiĝis?

Zam: Mi enlitiĝis je kvarono antaŭ la dua, alievorte unua kaj kvardek kvin. Kio pri vi?
Respondoalternativoj:

- Ankaŭ malfrue. Oj, mi estas malsata. Kion vi kutime manĝas matene?
- Mi enlitiĝis sufiĉe frue. Kion vi ŝatas manĝi post vekiĝo?

Zam: Matene mi manĝas nur fruktojn, ion alian mia organismo ne volas komence de la tago. Kion vi preferas kiel matenmanĝon?
Respondoalternativoj:

- Kutime nur kafon kaj eble bulkon. Kion vi faras kiam vi matenmanĝas?
- Mi preferas lakton kun multe da cerealoj kaj mielo. Ĉu vi faras ion specialan kiam vi matenmanĝas?

Zam: Kiam mi matenmanĝas mi spektas novaĵojn en la televido aŭ legas gazeton. Kaj vi, kion vi faras dum vi matenmanĝas?
Respondoalternativoj:

- Nenion specialan fakte. Pri kio vi sonĝis?
- Mi ĉiam legas la gazeton _Esperanto_ matene. Ĉu vi sonĝis ion ĉi-nokte?

Zam: Ĉi-nokte mi sonĝis ke mi ludas tenison kaj ke mi bonege ludas. Subite venis iu grandega policisto kaj kaptis min ĉar mi tro bone ludis. Estis tre stranga sonĝo... Ĉu vi sonĝis ion?
Respondoalternativoj:

- Mi pensas ke ne, almenaŭ mi ne memoras ion.
- Ho, jes. Mi sonĝis ke mi dancis en la lunlumo kun tri rozkoloraj lupoj.

Zam: Interese.. Tempo por labori. Ĝis, amiko!
Respondoalternativoj:

- Ankaŭ mi iru nun al mia laborejo. Agrablan tagon!
- Bone laboru, ĝiiiis!

Parto 3 - ...sian tenispartneron

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Ana: Jen vi! Diable, kie vi estis?
Tenispartnero: Saluton Ana, pardonon...
Ana: Ĉu ĉio estas en ordo?
Tenispartnero: Jes... Sed mi maltrafis unu buson.
Ana: Dudek tri minutojn vi malfruas, mi preskaŭ decidis foriri.
Tenispartnero: Mi ĝojas ke vi restas! Tre tenisema mi estas.
Ana: Ankaŭ mi. Pardonu mian malbonan humoron. Mi ne sufiĉe dormis ĉi-nokte kaj eble pro tio perdis mian paciencon.
Tenispartnero: Mi komprenas. Ne gravas. Mi tamen esperas ke vi havas sufiĉe da fortoj por unu maĉo...
Ana: Ho, jes! Mi pretas por forte bati. Ek al la tenisejo!
Tenispartnero: Jes ja! Sed ne tro malĝoju se mi facile venkos, mi sentas ke mi bonege ludos hodiaŭ.
Ana: Ha, mi ne timas viajn batojn!

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kial la tenispartnero de Ana malfruis?

2) Kial Ana estis malbonhumora?

3) Kiu, vi pensas, gajnis la maĉon?

Dialogue Exercises for part 3

Zam: Pardonu min! Ĉu mi multe malfruas?
Vi: _____

Zam: Mi devis finfari kelkajn aferojn kaj forgesis pri nia renkontiĝo, pro tio mi malfruas. Mi denove pardonpetas. Kioma horo estas nun?
Vi: _____

Zam: Jes, mi havas horloĝon. Belan brakhorloĝon mi havas, sed ĝi ne funkcias. Ĉu vi havas horloĝon?
Vi: _____

Zam: Mi ne certas kial mia horloĝo ne funkcias. Eble la baterioj malpleniĝis. Mi planas aĉeti novajn baldaŭ. Alia afero: Se estas ekzemple duono post la naŭa vespere, ĉu vi preferas diri "naŭa kaj duono", "tridek minutoj antaŭ la deka" aŭ eble "dudekuna kaj tridek"?
Vi: _____

Zam: Mi preferas "naŭa kaj tridek". Skribe "21.30". Kio pri datoj? Kiel vi kutimas skribi daton?
Vi: _____

Zam: Por mi plej logike estas skribi en formo jaro-monato-tago. Komparu kun horoj, minutoj kaj sekundoj! Ĉu estus logike skribi ekzemple horoj-sekundoj-minutoj? Ŝajnas al mi ke ne... Ĉiukaze, ĉu vi pretas por ekludi?
Vi: _____

Zam: Kie estas mia batilo? Bonega demando, ŝajnas ke mi forgesis ĝin... Do, ni devas ion alian fari! Mi proponas ke ni iru al vendejo kun baterioj. Ĉu bone?
Vi: _____

Zam: Perfekte, do ni eku!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 3

Zam: Pardonu min! Ĉu mi multe malfruas?
Respondoalternativoj:

- Jes, preskaŭ horon. Kial tiom multe?
- Nur kelkajn minutojn. Kion vi faris?

Zam: Mi devis finfari kelkajn aferojn kaj forgesis pri nia renkontiĝo, pro tio mi malfruas. Mi denove pardonpetas. Kioma horo estas nun?
Respondoalternativoj:

- Estas la kvina kaj tridek kvar. Ĉu vi ne havas horloĝon?
- Iom antaŭ la naŭa. Sed vi ja havas horloĝon, ĉu ne?

Zam: Jes, mi havas horloĝon. Belan brakhorloĝon mi havas, sed ĝi ne funkcias. Ĉu vi havas horloĝon?
Respondoalternativoj:

- Evidente jes. Kial via horloĝo ne funkcias?
- Ne, sed mi vidas horloĝon sur la muro tie. Ĉu vi scias kial via horloĝo ne funkcias?

Zam: Mi ne certas kial mia horloĝo ne funkcias. Eble la baterioj malpleniĝis. Mi planas aĉeti novajn baldaŭ. Alia afero: Se estas ekzemple duono post la naŭa vespere, ĉu vi preferas diri "naŭa kaj duono", "tridek minutoj antaŭ la deka" aŭ eble "dudekuna kaj tridek"?
Respondoalternativoj:

- Por mi ne tre gravas.. Ĉu por vi gravas?
- Mi kutimas diri _naŭa tridek_. Kion vi mem preferas?

Zam: Mi preferas "naŭa kaj tridek". Skribe "21.30". Kio pri datoj? Kiel vi kutimas skribi daton?
Respondoalternativoj:

- Dependas de la kunteksto. Kaj vi?
- Mi ĉiam skribas tago-jaro-monato. Kiel estas por vi plej logike skribi?

Zam: Por mi plej logike estas skribi en formo jaro-monato-tago. Komparu kun horoj, minutoj kaj sekundoj! Ĉu estus logike skribi ekzemple horoj-sekundoj-minutoj? Ŝajnas al mi ke ne... Ĉiukaze, ĉu vi pretas por ekludi?
Respondoalternativoj:

- Mi pretas! Ĉu vi? Mi ne vidas vian batilon... Kie ĝi estas?
- Jes ja! Sed kie estas via batilo?

Zam: Kie estas mia batilo? Bonega demando, ŝajnas ke mi forgesis ĝin... Do, ni devas ion alian fari! Mi proponas ke ni iru al vendejo kun baterioj. Ĉu bone?
Respondoalternativoj:

- Ne sonas tre interese... Mi vere volis ludi tenison. Sed kion fari se vi ne havas batilon..
- Bone, tio estas en ordo por mi.

Zam: Perfekte, do ni eku!
Respondoalternativoj:

- Tre bone, ek al la butiko.
- Jes, antaŭen!

Parto 4 - ...sian klason

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Ana: Ej amikoj, kio okazas?!
Klasamiko1: Malmulte... mi ankoraŭ duondormas... Sed vi aspektas tre vigla.
Ana: Ho, jes. Mi ludis tenison kaj gajnis malfacilan maĉon. Tio donis al mi energion.
Klasamiko2: Espereble vi havos energion ankaŭ por testo pri la franca posttagmeze...
Ana: Kio?! Vi ŝercas, ĉu ne?
Klasamiko2: Mi timas ke ne. Laŭ sms-mesaĝo de amiko en nia paralela klaso ili nun havas teston pri la franca. Temas pri unu el la timigaj "neatenditaj testoj" de sinjoro Kadar.
Ana: Do, tio signifas ke ni havos ĝin posttagmeze dum nia franca leciono. Ŝajne vi pravas... Fek'!
Klasamiko1: Terure, ĉu ne? Ankaŭ mi ne studis pri la franca lastatempe.
Ana: Subite mi sentas min tre malsana.
Klasamiko1: Vi ne aspektas malsana. Nur tre vigla, iom kolera kaj....
Klasamiko2: Kaj kio? Ha, vidu! Nia kara laculo ruĝiĝas.
Klasamiko3: Ŝajnas al mi ke li volis diri "kaj tre bela" aŭ ion similan.
Ana: Buboj, ĉesu! Ni devas nun koncentriĝi je la franca testo.
Klasamiko2: Kiel diri "tre bela" en la franca?
Klasamiko3: Mi scias kiel diri "Mi amas vin Ana", se iu volas scii...
Ana: Stultuloj vi estas!
Klasamiko2: Ne, ni nur provas helpi vin du pri la franca...

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kial Ana havis multe da energio kiam ŝi aperis?

2) Kiam la klaso de Ana havos la "neatenditan teston" en la franca?

3) Kiel ili povas scii tion jam nun?

Dialogue Exercises for part 4

Zam: Ĉu vi ŝatas/is esti en la lernejo?
Vi: _____

Zam: Mi foje ŝatis, foje tute ne ŝatis. Dependis de la instruisto kaj de la fako. Kiuj fakoj estas/is plej interesaj por vi?
Vi: _____

Zam: Mi ĉefe interesiĝis pri matematiko kaj komputiko, speciale pri programado kaj Interreto. Ĉu vi dum multaj jaroj uzas Interreton?
Vi: _____

Zam: Mi jam dum pli ol dek jaroj ĝuas Interreton. En la jaro mil naŭcent naŭdek du (1992) mi komencis uzi retpoŝton. Mi tre ŝatis. Poste estis mirinda sperto krei mian unuan hejmpaĝon. Por kio vi uzas Interreton?
Vi: _____

Zam: Por mi Interreto estas kaj kontaktilo kaj mia laborejo. Per retpoŝto kaj tujmesaĝiloj mi estas en kontakto kun amikoj el multaj landoj. Lastatempe mi laboras per Interreto, instruante Esperanton. Cetere, ĉu vi aŭdis pri Esperanto@Interreto-seminarioj?
Vi: _____

Zam: Jes, mi ofte aŭdis pri ili. Mi fakte partoprenis en kelkaj. Ili estas tre interesaj se oni volas spertiĝi pri retaĵoj kaj ŝatas seminariojn kun multe da E-junuloj. Jen ttt-paĝo kun informoj kaj bildoj se vi interesiĝas: www.ikso.net/seminarioj.
Vi: _____

Zam: Bone. Ĝis la!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 4

Zam: Ĉu vi ŝatas/is esti en la lernejo?
Respondoalternativoj:

- Jes, estis bona tempo. Ĉu vi ŝatis?
- Ne, mi malamas esti en la lernejo. Ĉu ankaŭ vi?

Zam: Mi foje ŝatis, foje tute ne ŝatis. Dependis de la instruisto kaj de la fako. Kiuj fakoj estas/is plej interesaj por vi?
Respondoalternativoj:

- Mi plej ŝatis sportlecionojn. Pri kio vi interesiĝis?
- Kemio kaj biologio plej interesis min. Kion vi plej ŝatis?

Zam: Mi ĉefe interesiĝis pri matematiko kaj komputiko, speciale pri programado kaj Interreto. Ĉu vi dum multaj jaroj uzas Interreton?
Respondoalternativoj:

- Ne tiom da jaroj. Ĉu vi?
- Jes, dum pluraj jaroj jam. Ĉu vi dum longa tempo Interretumas?

Zam: Mi jam dum pli ol dek jaroj ĝuas Interreton. En la jaro mil naŭcent naŭdek du (1992) mi komencis uzi retpoŝton. Mi tre ŝatis. Poste estis mirinda sperto krei mian unuan hejmpaĝon. Por kio vi uzas Interreton?
Respondoalternativoj:

- Ĉefe por sendi retpoŝtmesaĝojn kaj retbabili. Kio Interreto estas por vi?
- Por multaj aferoj. Ekzemple por kontakti amikojn, fari transpagojn, spekti filmojn ktp. Kiel vi uzas la reton?

Zam: Por mi Interreto estas kaj kontaktilo kaj mia laborejo. Per retpoŝto kaj tujmesaĝiloj mi estas en kontakto kun amikoj el multaj landoj. Lastatempe mi laboras per Interreto, instruante Esperanton. Cetere, ĉu vi aŭdis pri Esperanto@Interreto-seminarioj?
Respondoalternativoj:

- Ne, neniam. Kio estas? Ĉu vi ofte aŭdis pri ili?
- Jes, kelkfoje. Ĉu vi?

Zam: Jes, mi ofte aŭdis pri ili. Mi fakte partoprenis en kelkaj. Ili estas tre interesaj se oni volas spertiĝi pri retaĵoj kaj ŝatas seminariojn kun multe da E-junuloj. Jen ttt-paĝo kun informoj kaj bildoj se vi interesiĝas: www.ikso.net/seminarioj.
Respondoalternativoj:

- Dankon, mi eble rigardos poste..
- Bonege, mi tuj rigardos.

Zam: Bone. Ĝis la!

Respondoalternativoj:

- Ĝis! Fartu bone Zam!
- Ĝis poste!

Parto 5 - siajn gefratojn posttagmeze

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Frato: Ana, bonan tagon! Kiel vi?
Ana: Iom laca. Ni havis grandan teston hodiaŭ en la lernejo. Kio pri vi?
Fratino: Tute bone, ni antaŭĝojas iri al la naĝejo!
Frato: Ni rajtos esti tie dum la tuta vespero, bonege ĉu ne?
Ana: Jes, certe bonege por vi du fiŝoj.
Fratino: Kaj kio estas via plano por la vespero?
Ana: Verŝajne mi iros al kinejo kun amiko.
Frato: Kiun filmon vi spektos?
Ana: Mi tute ne scias, ni devas unue decidi ĉu ni iros aŭ ne.
Frato: Stranga logiko por mi. Unue mi rigardas ĉu estas bona filmo kaj poste mi decidas ĉu mi iros al la kinejo.
Fratino: Kaj kiuj estas "ni"?
Ana: Mi kaj unu amiko.
Fratino: Kiu amiko?
Ana: Nova amiko.
Fratino: Mi ne demandis kia amiko sed KIU amiko?
Ana: Iu amiko. Mi eble iros al iu filmo kun iu amiko. Ĉu klare?
Frato: Por mi tre malklare...
Fratino: Por mi tute klare: Ana planas iri al kinejo kun sia nova koramiko, kompreneble.
Frato: Ĉu? Interese, mi ne sciis ke vi havas novan koramikon.
Ana: Kaj mi ankaŭ ne havas tian. Via fratino iom tro fantazias foje, ĉu vi ne lernis tion?
Frato: Nu, jes.
Fratino: Ne aŭskultu ŝin, ŝi volas nur kaŝi ke ŝi renkontos sian novan amaton ĉi-vespere!
Ana: Karaj, mi ne plu havas tempon por vi. Mi devas telefoni...
Frato: Al kiu?
Ana: Al IU.
Ambaŭ gefratoj: Salutu lin de ni!!

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to

get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Pri kio antaŭĝojas la gefratoj de Ana?

2) Kion, laŭ ŝia fratino, Ana planas fari vespere?

3) Kial Ana ne plu havas tempon por siaj karaj gefratoj?

Dialogue Exercises for part 5

Zam: Bonan tagon!
Vi: _____

Zam: Dankon ke vi demandas. Bedaŭrinde mi ne fartas tro bone hodiaŭ. La kapo doloras kaj mi sentas min ege laca. Kio pri vi? Ĉu vi fartas bone?
Vi: _____

Zam: Mi ne scias kial mi tiom lacas... Eble ĉar mi tro laboris lastatempe. Mi ŝatas labori, sed foje mi tro laboras kaj tiam mi fariĝas tre laca kaj perdas inspiron. Mi antaŭĝojas mian liberan tagon morgaŭ. Ĉu vi antaŭĝojas pri io?
Vi: _____

Zam: Dum mia libera tago mi planas iri al la naturo, trovi trankvilan lokon ĉe iu granda arbo kaj sidi sub ĝi dum longa tempo. Nur por ĝui la belan naturon kaj eble legi iun libron. Ĉu vi ŝatas legi librojn?
Vi: _____

Zam: Mia plej ŝatata libro estas "Tien" de Claude Piron. Ĝi priskribas tre interesan mondon en kiu estas pli da harmonio ol en nia mondo. Ankaŭ ĝia lingvaĵo estas tre plaĉa. Ĉu vi povas rekomendi iun libron al mi?
Vi: _____

Zam: Dankon por via rekomendo! Mi provos trovi la libron iam.
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 5

Zam: Bonan tagon!
Respondoalternativoj:

- Ej, saluton! Kiel vi hodiaŭ?
- Bonan! Ĉu ĉio en ordo?

Zam: Dankon ke vi demandas. Bedaŭrinde mi ne fartas tro bone hodiaŭ. La kapo doloras kaj mi sentas min ege laca. Kio pri vi? Ĉu vi fartas bone?
Respondoalternativoj:

- Jes, tute bone. Kial vi estas tiom laca?
- Ne, sed mi ne plendu. Ĉu vi scias kial vi estas havas kapdoloron kaj estas laca?

Zam: Mi ne scias kial mi tiom lacas... Eble ĉar mi tro laboris lastatempe. Mi ŝatas labori, sed foje mi tro laboras kaj tiam mi fariĝas tre laca kaj perdas inspiron. Mi antaŭĝojas mian liberan tagon morgaŭ. Ĉu vi antaŭĝojas pri io?
Respondoalternativoj:

- Ne vere. Kion vi planas fari dum via libera tago?
- Jes, mi antŭĝojas pri mia vojaĝo al la maro! Kion vi faros morgaŭ?

Zam: Dum mia libera tago mi planas iri al la naturo, trovi trankvilan lokon ĉe iu granda arbo kaj sidi sub ĝi dum longa tempo. Nur por ĝui la belan naturon kaj eble legi iun libron. Ĉu vi ŝatas legi librojn?
Respondoalternativoj:

- Jes, tre. Kiu estas via plej ŝatata libro?
- Foje plaĉas al mi. Ĉu vi havas iun rekomendon?

Zam: Mia plej ŝatata libro estas "Tien" de Claude Piron. Ĝi priskribas tre interesan mondon en kiu estas pli da harmonio ol en nia mondo. Ankaŭ ĝia lingvaĵo estas tre plaĉa. Ĉu vi povas rekomendi iun libron al mi?
Respondoalternativoj:

- Mi povas rekomendi al vi la libron...
- Jes, mi devas iom pensi. _La urso en mi_ estas tre leginda.

Zam: Dankon por via rekomendo! Mi provos trovi la libron iam.
Respondoalternativoj:

- Sukceson!
- Sonas bone.

Parto 6 - ...sian iun

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Ana: Ĉu vi ŝatis la filmon?
Iu: Nu, ĝi estis pli bona ol la franca leciono hodiaŭ...
Ana: Jes, sed ne multe.
Iu: Prave. Certe ĝi ne estis unu el la plej bonaj filmoj kiujn mi spektis.
Ana: Sed almenaŭ estis tre belaj geaktoroj, ĉu ne?
Iu: Ankaŭ mi pensis pri tio. La ĉefrolulino aspektis preskaŭ kiel anĝelo por mi. Kaj la viro kun la bukla nigra hararo certe ne estis malbela.
Ana: Li iom similis al vi mi pensas...
Iu: Ĉu vere?
Ana: Jes, vi same dolĉe ridas kiel tiu aktoro. Fakte, eĉ pli dolĉe.
Iu: Mi dankas. Nun mi certe ruĝiĝas denove...
Ana: Ne gravas. Ankaŭ tiam vi estas dolĉa.
Iu: Vi troigas.
Ana: Kion vi volis diri matene sed ne kuraĝis?
Iu: Tiam kiam ni eksciis pri la franca testo?
Ana: Jes, ĝuste tiam.
Iu: Nu mi estis laca kaj ne bone regis mian buŝon. Mi volis diri al vi jam antaŭe, sed certe ne kiam ĉeestis aliaj...
Ana: Mi komprenas, ankaŭ mia parolado strangas kiam mi lacas.
Iu: Ĉiukaze, mi volis diri ke mi tre -- Sonooooor' --. Aj, estas mia poŝtelefono. Pardonu min.
Iu per sia telefono: Jes? Saluton kara! Ankaŭ mi sopiras al vi! Jes, mi volonte venos al vi ĉi-nokte, estos tiom bone.... Kaj kiam ekos la venonta trajno? Bone, eblas se mi tuj kuras! Ĝis baldaŭ, karulino!
Ana: Do, vi devas jam iri?
Iu: Jes, tuj. Mi bedaŭras sed mi devas kapti unu trajnon. Dankon por inviti min al filmo, mi havis tre agrablan vesperon! Ĝis la lernejo!
Ana: Ĝis...

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kio estis la plej bona pri la filmo laŭ Ana kaj ŝia amiko?

2) Al kiu similas la amiko laŭ Ana?

3) Kiu telefonis al la amiko vi pensas?

Dialogue Exercises for part 6

Zam: Resaluton! Kion vi faras?
Vi: _____

Zam: Mi ĵus revenis de la kinejo. Mirinde bonan filmon mi spektis. Ĉu vi ofte spektas filmojn?
Vi: _____

Zam: Mi nun spektis "Matrico reŝargita". Ĉu vi aŭdis pri ĝi?
Vi: _____

Zam: Plej multe mi ŝatis la efektojn en la filmo, nekredeble realismaj ili estis. La rakonto de la filmo estis pensiga, sed mi ne ĉion komprenis. Mi revas pri same altkvalita filmo pri iu rakonto rilate al Esperanto, estus tre bona reklamo por la lingvo. Ĉu vi pensas ke tia filmo povus esti populara?
Vi: _____

Zam: Ne, mi ne pensas ke iu en Holivudo faros filmon pri Esperanto. Sed mi tamen revas pri tio foje... Ĉu vi foje revas pri io? Se jes, pri kio?
Vi: _____

Zam: Bela revo. Mi esperas ke ĝi realiĝos iam!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 6

Zam: Resaluton! Kion vi faras?
Respondoalternativoj:

- Sa Zam! Mi aŭskultas muzikon. Kio okazas ĉe vi?
- Saluton, amiko. Mi ne faras ion specialan. Kion vi faras?

Zam: Mi ĵus revenis de la kinejo. Mirinde bonan filmon mi spektis. Ĉu vi ofte spektas filmojn?
Respondoalternativoj:

- Jes, preskaŭ ĉiutage. Kiun filmon vi spektis?
- Ne, mi ne havas la monon. Kio pri la filmo kiun vi spektis?

Zam: Mi nun spektis "Matrico reŝargita". Ĉu vi aŭdis pri ĝi?
Respondoalternativoj:

- Jes ja, ĝi estas tre bona. Ĉu vi ŝatis ĝin?
- Mi pensas ke ne.. Ĉu ĝi estis bona?

Zam: Plej multe mi ŝatis la efektojn en la filmo, nekredeble realismaj ili estis. La rakonto de la filmo estis pensiga, sed mi ne ĉion komprenis. Mi revas pri same altkvalita filmo pri iu rakonto rilate al Esperanto, estus tre bona reklamo por la lingvo. Ĉu vi pensas ke tia filmo povus esti populara?
Respondoalternativoj:

- Mi timas ke ne. Ĉu vi vere pensas ke tio estas realisma ideo?
- Jes, kial ne. Sed kiu volus fari tian filmon? Ĉu iu en Holivudo?

Zam: Ne, mi ne pensas ke iu en Holivudo faros filmon pri Esperanto. Sed mi tamen revas pri tio foje... Ĉu vi foje revas pri io? Se jes, pri kio?
Respondoalternativoj:

- Jes, mi revas pri geedziĝi kun mia sekreta amo.
- Malofte mi revas pri io fakte. Sed iam mi revis pri fariĝi rokstelo.

Zam: Bela revo. Mi esperas ke ĝi realiĝos iam!
Respondoalternativoj:

- Dankon!
- Jes, ankaŭ mi.

Parto 7 - ...sian patron vespere

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.

Patro: Ana, mia kara, bone revidi vin.
Ana: Samon. Kion vi faras?
Patro: Atendas vin fakte, volas oferti al vi iom da supo. Mi provis novan recepton, mi esperas ke vi ŝatos ĝin.
Ana: Mi ne estas malsata...
Patro: Nu, iom da supo vi certe povas manĝi. Nur por gustumi. Venu, mi petas, al la kuirejo.
Ana: Mi scias ke ĝi estas tre bona, viaj supoj ĉiam estas bongustaj.
Patro: Ana, mi ne rekonas vin! Vi neniam rifuzas provi novan supon... En tiu ĉi estas karotoj kaj florbrasiko kaj iom da cepo. Mi eĉ metis vian plej ŝatatan spicon en ĝin. Jen telero por vi.
Ana: Dankon.
Patro: Morgaŭ mi planas kuiri grandan fiŝmiksaĵon kaj poste porti ĝin al miaj kolegoj, ili kutime tre ĝojas kiam mi portas ion manĝeblan al ili. Do, kion vi pensas pri la supo?
Ana: Ĝi estas bona. Sed, kiel mi diris, mi ne estas malsata, fakte mi ne fartas tute bone... Mi pensas ke mi enlitiĝu nun.
Patro: Kiel vi volas, mia filino. Mi esperas ke vi pli bone fartos morgaŭ kaj ke vi povos manĝi multe de mia fiŝmiksaĵo.
Ana: Certe. Bonan nokton.
Patro: Sonĝu pri io bongusta!

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Kial la patro de Ana atendis ŝin?

2) Ĉu Ana ŝatis la supon? Ĉu ŝi manĝis multe da ĝi?

3) Kion diris la patro pri siaj kolegoj?

Dialogue Exercises for part 7

Zam: Bonan vesperon!
Vi: _____

Zam: Ne dankon, mi nenion volas manĝi. Mi estas tute sata. Tamen, se vi havas iun sukon mi volonte trinkus glason da ĝi.
Vi: _____

Zam: Ne dankon, mi ne volas vodkon en la suko. Mi ne volas drinki ĉi-vespere. Ĉu vi havas glacion?
Vi: _____

Zam: Jes, mi volas grandan glason. Koran dankon. Mi estas tre soifa. Mi ĵus manĝis grandan picon kaj ĝi estis iom sala, pro tio mi estas tiom soifa nun. Kion vi preferas trinki kiam vi estas tre soifa?
Vi: _____

Zam: Mi aŭdis pri viro kiu diris: "Mi instruis al mia ĉevalo kiel vivi sen manĝi. Mi planis ekinstrui al ĝi ankaŭ kiel vivi sen trinki, sed bedaŭrinde ĝi mortis hieraŭ!" Freneza viro, ĉu ne?
Vi: _____

Zam: Ne, mi ne memoras alian amuz-rakonteton nun. Ĉu vi konas iun?
Vi: _____

Zam: Ha ha ha, ĝi estas vere amuza!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 7

Zam: Bonan vesperon!
Respondoalternativoj:

- Saluton kaj bonvenon! Ĉu vi eble volus manĝi ion?
- Kara Zam, mi ĝojas revidi vin! Kion mi povas oferti al vi? Vi volas ion manĝi, ĉu ne?

Zam: Ne dankon, mi nenion volas manĝi. Mi estas tute sata. Tamen, se vi havas iun sukon mi volonte trinkus glason da ĝi.
Respondoalternativoj:

- Certe mi havas sukon. Ĉu vi volas ĝin kun vodko?
- Sukon vi havos! Kun vodko mi supozas, ĉu prave?

Zam: Ne dankon, mi ne volas vodkon en la suko. Mi ne volas drinki ĉi-vespere. Ĉu vi havas glacion?
Respondoalternativoj:

- Jes ja, kun glacio. Ĉu grandan glason vi volas?
- Ne, bedaŭrinde. Vi volas grandan glason, ĉu ne?

Zam: Jes, mi volas grandan glason. Koran dankon. Mi estas tre soifa. Mi ĵus manĝis grandan picon kaj ĝi estis iom sala, pro tio mi estas tiom soifa nun. Kion vi preferas trinki kiam vi estas tre soifa?
Respondoalternativoj:

- Malvarman bieron. Ĉu vi havas ion amuzan por rakonti?
- Por mi akvo kun citrono ĉiam plej bonas. Rakontu ion amuzan mi petas.

Zam: Mi aŭdis pri viro kiu diris: "Mi instruis al mia ĉevalo kiel vivi sen manĝi. Mi planis ekinstrui al ĝi ankaŭ kiel vivi sen trinki, sed bedaŭrinde ĝi mortis hieraŭ!" Freneza viro, ĉu ne?
Respondoalternativoj:

- Jes, vere. Ĉu vi konas pli da amuzrakontetoj?
- Nu, iom, sed li almenaŭ havis planon. Mi volas aŭdi ankoraŭ unu amuzrakonteton!

Zam: Ne, mi ne memoras alian amuz-rakonteton nun. Ĉu vi konas iun?
Respondoalternativoj:

- Jes. Ĉu vi aŭdis tiun pri la viro, la porko kaj la hundo? Jen ĝi...
- Certe, jen mia plej ŝatata: ...

Zam: Ha ha ha, ĝi estas vere amuza!
Respondoalternativoj:

- Dankon, dankon.
- Tamen, mi pensas ke la via estis pli amuza.

Parto 8 - ...sian ĉinan amikinon

Text

Please listen to and read the text. It is best if you first listen to the text, and then read it out loud to yourself. Click on any word you don't understand and the translation will automatically appear in the dictionary.



Ana: Ĉu tie?
Amikino: Jes, mi ĵus vekiĝis kaj volas nun legi retpoŝton.
Ana: Ĉu vi havas tempon iom paroli?
Amikino: Jes, certe. Ĉiam mi havas tempon por mia plej bona retamiko :-).
Ana: Bonege, dankon. Mi spertis ion tre konfuzan ĉi-vespere kaj volas havi konsilon kion pensi pri ĝi.
Amikino: Mi provos. Bonvolu rakonti kio okazis.
Ana: Do, vi scias ke mi dum iom da tempo interesiĝas pri unu klasamiko kaj hodiaŭ mi trovis kuraĝon por inviti lin al glaciaĵejo kaj poste al kinejo.
Amikino: Tre bone. Mi ja diris ke vi devas iam renkonti lin sola por povi pli bone kompreni kion vi sentas por li.
Ana: Jes, kaj ĉio sentiĝis vere bone kiam ni parolis manĝante glaciaĵon kaj kiam ni sidis tre proksime unu al la alia dum la filmo.
Amikino: Mi ĝojas! Sed kial vi estas konfuzita? Ĉu vi pensas ke li ne ŝatis?
Ana: Mi havis la impreson ke ankaŭ li ĝuis la kunumadon, li multe ridetis kaj estis tre ĉarma kaj afabla al mi. Foje li ankaŭ ruĝiĝis, dolĉa li estis!
Amikino: Jes jes, sed do kio estas la problemo? Al mi sonas kvazaŭ vi baldaŭ fariĝos paro.
Ana: Ankaŭ mi kredis tion... Sed post la filmo iu telefonis al li kiun li nomis "karulino". Fakte li tre abrupte forlasis min por iri al ŝi por fari mi ne scias kion...
Amikino: Hmm, sed eble estis lia fratino aŭ kuzino aŭ simple bona amikino. Almenaŭ en mia familio ni foje nomas gekuzon aŭ gefraton "karulo" aŭ "karulino".
Ana: Povas esti... Tamen mi havis la senton ke temas pri amatino aŭ koramikino de li...
Amikino: Kara, ne estu tro malgaja. Oni neniam scias kion volas la sorto pri niaj vivoj. Lasu al mi citi mallongan ĉinan popolrakonton.
Ana: Jes, bone, mi "aŭskultos".
Amikino: Estis kamparano kiu havis tre belan kaj por li utilan

ĉevalon, sed unu tagon la ĉevalo forkuris de li. Kiam liaj najbaroj aŭdis pri tio ili ĉiuj tre kompatis lin kaj estis tre zorgitaj. Sed la kamparano diris "Nu, oni neniam scias kia estas la plano de la vivo. Mi ĉiam sentas fidon ke iel solviĝos.". Post kelkaj tagoj la ĉevalo revenis kaj kun si ĝi havis plurajn belegajn sovaĝĉevalojn. Ĉi-foje la najbaroj tre gratulis la kamparanon. La kamparano estis kompreneble feliĉa sed samtempe trankvila kaj ne troigis la okazaĵon kaj diris "oni neniam scias kio okazos en la vivo sed gravas ĝui ĝin kiam eblas". Kiam la filo de la kamparano rajdis sur unu el la sovaĝĉevaloj li falis kaj rompis sian gambon. Denove la najbaroj tre bedaŭris la grandan malfeliĉon, nun la filo ja ne povis helpi al la kamparano pri gravaj taskoj. Sed la kamparano daŭre restis trankvila kaj klarigis ke oni fidu je la vivo. Post ne longa tempo montriĝis ke ekestis milito en apuda regiono kaj ĉiuj junaj viroj devis iri al armeo por batali. Pro la rompita gambo la filo de la kamparano ne povis militi kaj la najbaroj gratulis al la bonŝanco de la kamparano, ja almenaŭ la filo ne riskis morti. Tiel daŭras la rakonto, okazaĵo post okazaĵo.
Ana: Interese.
Amikino: La konkludo, laŭ mi, estas ke tre malfacilas scii kial kelkaj aferoj okazas sed ke el longa perspektivo ĉiuj estas necesaj eroj de niaj vivoj sur la tero. Do, ĝuu la vivon kiam eblas kaj ne tro zorgu kiam okazas malfacilaĵoj!
Ana: Pli facile dirite ol farite... Tamen mi provos pensi kiel la kamparano. Estis bone babili kun vi! Nun mi devas dormi.
Amikino: Bonegan nokton kaj fortojn al vi!
Ana: Dankon. Ĉion bonan kaj ĝis!
Amikino: Ĝis kaj kis'

Exercise

Please answer the questions using complete sentences. (Write according to the x-system to get circumflexes. For example: "posxto" becomes "posxto".)

1) Pri kio volis Ana paroli kun sia plej bona retamiko?

2) Kie Ana kaj ŝia amiko estis antaŭ ol ili iris al la kinejo?

3) Ĉu la pensmaniero de la kamparano ŝajnas bona al vi?

4) Kion vi pensas pri tiu ĉi kurso?

Dialogue Exercises for part 8

Zam: Ĉu vi kredas je Dio?
Vi: _____

Zam: Mi ne scias ĉu mi kredas je Dio. Por mi estas tre malfacile imagi kio aŭ kiu estus Dio... Ĉu vi kredas je vivo post la morto?
Vi: _____

Zam: Jes, mi kredas je iu vivo post la morto. Aŭ almenaŭ mi esperas je tio. Mi ŝatus en iu vivo post tiu ĉi renkonti parencojn kaj amikojn kiuj jam mortis . Tio estus bela, ĉu ne? Ĉu vi pensas ke la tero estas pli bona vivloko ol antaŭ 100 jaroj?
Vi: _____

Zam: Mi iel pensas ke la mondo pozitive evoluis. Ekzemple, ni hodiaŭ malofte batas niajn infanojn, virinoj rajtas voĉdoni, ni traktas la bestojn iom pli bone, Eŭropo unuiĝas sen devigo de iu militforto, pli kaj pli da homoj povas legi kaj skribi ktp. Certe restas multege da aferoj por plibonigi, sed espereble ni paŝon post paŝo antaŭeniras. Ĉu vi pensas ke Esperanto iam estos granda kaj grava lingvo por la homaro?
Vi: _____

Zam: Mi pensas ke jes, sed ne pensas ke tio okazos baldaŭ... Kaj certe ne okazos de si mem. Necesas ke multe da homoj aktive uzu la lingvon. Kiel vi uzas aŭ ŝatus uzi Esperanton?
Vi: _____

Zam: Kara amiko, estis tre agrable paroli kun vi! Mi deziras al vi sukceson pri ĉiuj viaj planoj kaj deziroj! Ĉion bonan!!
Vi: _____

Respondoj al Dialogue Exercises for part 8

Zam: Ĉu vi kredas je Dio?
Respondoalternativoj:
- Tute ne. Ĉu vi?
- Mi ne certas, eble foje.. Ĉu vi kredas je Dio?

Zam: Mi ne scias ĉu mi kredas je Dio. Por mi estas tre malfacile imagi kio aŭ kiu estus Dio... Ĉu vi kredas je vivo post la morto?
Respondoalternativoj:
- Ne, mi pensas ke ni tute malaperas post la morto. Kion vi pensas pri tio?
- Malfacila demando... Mi nek kredas nek ne kredas fakte. Ĉu vi kredas je vivo post la morto?

Zam: Jes, mi kredas je iu vivo post la morto. Aŭ almenaŭ mi esperas je tio. Mi ŝatus en iu vivo post tiu ĉi renkonti parencojn kaj amikojn kiuj jam mortis . Tio estus bela, ĉu ne? Ĉu vi pensas ke la tero estas pli bona vivloko ol antaŭ 100 jaroj?
Respondoalternativoj:
- Mi ne povas diri, mi ja ne vivis tiam. Ĉu vi pensas ke jes?
- Jes, ŝajnas al mi ke jes. Kion vi pensas?

Zam: Mi iel pensas ke la mondo pozitive evoluis. Ekzemple, ni hodiaŭ malofte batas niajn infanojn, virinoj rajtas voĉdoni, ni traktas la bestojn iom pli bone, Eŭropo unuiĝas sen devigo de iu militforto, pli kaj pli da homoj povas legi kaj skribi ktp. Certe restas multege da aferoj por plibonigi, sed espereble ni paŝon post paŝo antaŭeniras. Ĉu vi pensas ke Esperanto iam estos granda kaj grava lingvo por la homaro?
Respondoalternativoj:
- Kial ne? La angla imperio certe iam falos same kiel ĉiuj aliaj imperioj falis antaŭe. Kio estas via opinio pri tio?
- Ne, tio neniam okazos. Sed mi tamen ŝatas la lingvon. Ĉu vi kredas je Esperanto kiel iama mondlingvo?

Zam: Mi pensas ke jes, sed ne pensas ke tio okazos baldaŭ... Kaj certe ne okazos de si mem. Necesas ke multe da homoj aktive uzu la lingvon. Kiel vi uzas aŭ ŝatus uzi Esperanton?
Respondoalternativoj:
- Mi volas vojaĝi per Esperanto kaj sperti fremdajn landojn.
- Mi ne certas, ni vidos. Espereble mi iel uzos la lingvon sed malklaras pri kio...

Zam: Kara amiko, estis tre agrable paroli kun vi! Mi deziras al vi sukceson pri ĉiuj viaj planoj kaj deziroj! Ĉion bonan!!
Respondoalternativoj:
- Dankon, Zam! Ankaŭ mi ĝojis paroli kun vi.
- Mi dankas kaj deziras la samon al vi!

Wrapping up

Congratulations! Now you have passed every part of the course "Ana meets." To continue your Esperanto studies, we recommend to you:

- trying the intermediate level course, Jen nia IJK
- learning new words with the flash cards
- reading through the explanations in the grammar

Also, you can join the online mailing list of TEJO. Every week you'll receive a short message about what's happening in Esperanto, which could be interesting to you. You can find information about how to join at http://abonu.com/catalog/info.tejo